Akademio Internacia de la Sciencoj

Accademia Internazionale delle Scienze

Internationale Akademie der Wissenschaften

International Academy of Sciences

San-Marino

Académie Internationale des Sciences

31-a SANMARINECA UNIVERSITATA STUDADSESIO

SUS 31

San-Marino (SM) / Rimini (IT)

2009-09-07 / 11

(1709 pfR/dfR)

Einunddreißigste Sanmarinesische Universitäre Studientagung

Trentunesima Sessione Universitaria Sammarinese

Thirty-first Sanmarinian University Session

Trente-et-unième Séance Universitaire Sanmarinienne

Laborlingvoj · lingue di lavoro · Arbeitssprachen · working languages · langues de travail
la Internacia Lingvo (ILo) · italiano · Deutsch · English · français

Enhavo

1 Oficialaĵoj . . . 2
2 Kursoj kaj prelegoj . . . 3
2.1 Sciencaj kursoj . . . 3
2.2 Liberaj, docentiĝaj kaj debutaj prelegoj (konferencprogramo de SUS 31) . . . 3
2.3 Arta Sektoro . . . 4
3 Kandidataj finekzamenoj . . . 4
4 Kadra Programo . . . 4
5 Organizaj detaloj . . . 5
5.1 Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj . . . 5
5.2 Prelegoj . . . 5
5.3 Administrado . . . 5
5.4 Aliĝo . . . 5
5.5 Mono . . . 6
5.6 Salonoj . . . 6
6 Instruteko . . . 8
7 Situo de Rimini kaj San-Marino . . . 8
7.1 Rimini kaj San Giuliano . . . 8
7.2 San-Marino . . . 9
7.3 Pliaj informoj . . . 10
7.4 Telefona krizo-voko . . . 11
Programtabelo . . . 12

Programo de SUS 31

La studadsesio SUS 31 de AIS okazos, samkiel SUS 30 en 2007, en Rimini (IT) en la ejo de CER-ES (Centro Esperantista de Rimini, ekumena, solidareca) kaj (je la lasta tago) en San-Marino (SM). CER-ES situas en via Briolini 48, kvartalo San Giuliano Mare (komparu la mapo-skizon sur paĝo 9). AIS sincere dankas al CER-ES pro la afabla disponigo.

La tempoj indikitaj en tiu ĉi eldono estas ankoraŭ provizoraj kaj povas ŝanĝiĝi. Bonvolu atenti informojn afiŝitajn de la SUS-sekretariejo.

1 Oficialaĵoj

dato	tempo	evento	salono
09-06 dim	21:00–22:00	senatkunsido (nepublika)	Descartes
	21:00–21:15	ekzamenofico (nepublika)	Descartes
09-07 lun	9:00–10:00	Inaŭguro de SUS 31	Boulanger
09-07 lun	10:00–10:30	Asembleo de la Subtena Sektoro	Boulanger
09-07 lun	20:00–20:30	sekcikunsidoj 1–6	sekcisalonoj
09-08 mar	20:00–20:30	membrar-kunveno de IAW (AIS Germanio)	Boulanger
09-09 mer	20:00–21:30	forumo pri akad. rekomendoj	Boulanger
09-11 ven	anoncota	studfinaj ekzamenoj	Boulanger
	anoncota	ĝenerala asembleo de SciS	Boulanger
	anoncota	fermo de SUS 31	Boulanger

2 Kursoj kaj prelegoj

2.1 Sciencaj kursoj

La sekvaj kursoj – valoraj po inter 0,5 kaj 1,0 stud-unuoj (stu) – okazos ekde lundo ĝis ĵaŭdo (09-07/10), en blokoj nomataj A/B/C/D[1]. La longa paŭzo tagmeza nomiĝas M. La kursestroj kaj kursanoj povas interkonsenti pri paŭzo dum la blokoj kaj kompensa plilongigo.

	A	B	M	C	D
tempo	9:00–10:30	11:00–12:30	12:30–15:00	15:00–16:30	17:00–18:30

Sekcio 1: Kibernetiko

K1 OProf. Dr. Reinhard Fössmeier (Munkeno, DE)
Enkonduko al Linukso (bloko C)

Sekcio 2: Humanistiko

H1 PDoc. Dr. habil. Věra Barandovská-Frank (Paderborn, DE)
Latinidaj planlingvoj (sen surlokaj lecionoj)

Dum SUS okazos nur eventuala kurs-ekzameneto; kursanoj devas prepari sin laŭ skriba kursmaterialo rete disponebla kaj skribe prilabori donitajn taskojn. Interesuloj ĝis komence de aŭgusto kontaktu la klerig-oficon de AIS. Dum SUS 31 ne plu eblas aliĝi al tiu ĉi kurso.

H2 OProf. Fabrizio Pennacchietti dr. (Torino, IT)
Enkonduko en la Maltan lingvon (bloko B)

La malta lingvo estas la sola semida lingvo, kiu estas ŝtata lingvo en EU-lando kaj tial oficiala lingvo de EU.

Sekcio 6: Morfosciencoj

M1 EProf. ADoc. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau prof dr (Haag, DE)
Eŭrologio (bloko A, lunde bloko D)

Post la dua mondmilito prof. I. M. Bocheriski (fama pri aplikado de la teorio de Steinhaus ĉe la batalo de Montecassino) fondis en Svislando la unuan universitaton eŭropan. De 1965 aperis provoj en Italio, poste en AIS fare de prof. Frank kaj lia teamo. En la jaro 2000, surbaze de proponoj el AIS, oni fondis 2 f. en Pollando, en la jaro 2009 en Internacia Universitato Karlovo (BG).

2.2 Liberaj, docentiĝaj kaj debutaj prelegoj (konferencprogramo de SUS 31)

Liberaj kaj projekt-akceptigaj prelegoj okazas en la sekciaj salonoj, sub la gvido de la dekanoj aŭ de iliaj komisiitoj. Dum SUS 31 ili ĝenerale okazas marde kaj merkrede en bloko D (17h00).

Docentiĝ- kaj debut-prelegojn laŭeble enkondukas dekano aŭ reprezentanto de la senato.

H-p1 Zlatko Hinšt dr. sc. dipl. oec. prof.
Problemoj de ekonomika terminologio (ma, 17h45)

N-p1 OProf. Hans Michael Maitzen dr.
La Internacia Jaro de Astronomio 2009 (UNO/UNESKO) kaj ĝia rilato de baza scienco al teknologio (me, 17h00)

N-p2 OProf. Rüdiger Sachs dr
Bernhard Grzimek (ma, 17h00)

N-p3 OProf. Rüdiger Sachs dr, EProf. ADoc. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau prof dr
Unua helpo: pri tropikaj malsanoj dum vojao, pri subitaj malsanoj dum konf. kaj kongresoj, sportaj agoj kaj necesa devigo ekskursoj havi apotekon kun bazaj helpiloj, tabulon kun bezonataj help-telefonoj, nebona ekzemplo Roterda (me, 17h45)

[1] Por eviti miskomprenojn ni ne uzas la literon Ĉ por marki blokon.

`M-p1` EProf. ADoc. Mag. Lewanderska-Quednau prof dr
Szerdahely, Lapenna, Klemensiewicz, Sygnarski, Frank – la ideo, instruado kaj edukado; kiom la komunan ili havas. (tempo anoncota)

`M-p2` EProf. ADoc. Mag. Lewanderska-Quednau prof dr
Ĉu en nuna EU estas lokoj por handikapuloj? (tempo anoncota)

`M-p3` EProf. ADoc. Dr.. Ljubiša Preradović, Aleksandar Đurić doc. dr., Predrag Gluhaković mag.
Intrareto de naciaj minoritatoj en Respubliko Serba (lu, 14h15)

2.3 Arta Sektoro

`AS1` ISKano Franz-Georg Rössler (Dudenhofen, DE)
La pola muziko kaj la mondo (bloko A, marde – ĵaŭde)

La kurso en tri lecionoj prezentas kulturajn influojn tien kaj reen. – Bonvolu atenti, ke la Arta Sektoro ne donas stud-unuojn.

3 Kandidataj finekzamenoj

La finekzamenoj por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de akademia nivelo (bakalaŭreco, magistreco, doktoreco aŭ habilit-doktoreco), okazas je vendredo: 09-11) en San-Marino, laŭ surloke afiŝota horaro. La tempoj estos tiaj, ke eblas atingi San-Marinon ĝustatempe per publika buso.

La kandidatprelegoj estas publikaj, kaj ĉiuj SUS-anoj estas bonvenaj ĉeesti la prelegojn de la kandidatoj kaj la postajn diskutojn. Parolaj fakekzamenoj (nepublikaj) kaj skribaj ekzamenoj (se necesaj) okazas laŭ horaro afiŝota de la Ekzamenofico.

Kandidatoj, pri kies dokumentoj estas iuj duboj, bonvolu jam antaŭ SUS interkonsenti kun la ekzamen-ofico pri la procedo por klarigi la dubojn. Ne okazas publikaj konsult-horoj.

La senato de AIS decidis, ke kandidatoj el reform-eŭropaj kaj kompareblaj landoj havu dum SUS 31 75-%-an rabaton je siaj ekzamen-kotizoj.

Por eviti problemojn bv. rekontroli, ĉu ĉiuj viaj ekzamen-dokumentoj jam troviĝas ĉe la Ekzamenofico!

Ĉiu kandidato antaŭ sia finekzameniĝo nepre devas esti enskribiĝinta al minimume du (2) sciencaj SUS-kursoj (se li ne jam havas la bezonatajn kurs-atestojn). Inter la du kursoj unu devas esti en la sekcio, en kiu okazas la kandidatiĝo, unu devas esti el alia sekcio. Entute estas bezonataj kvar (4) atestitaj kursaj studunuoj; nur por adapta adopto sufiĉas, laŭ la novaj regularoj, la du SUS-kursoj.

La Ekzamenofico atentigas kandidatojn, ke prezentiĝo al la fina ekzameno sen antaŭa regularkonforma kompletigo kaj disponigo de ĉiuj necesaj dokumentoj al la Ekzamenofico povas kaŭzi aŭ **malakcepton** de la kandidatiĝo aŭ **postulon de krompago** superanta la normalan ekzamenkotizon pro la kroma laboro.

4 Kadra Programo

Laŭtradicie AIS invitas ĉiujn SUS-anojn al la partopreno en la **Akademia Forumo** (2009-09-09) kun publika diskuto.

Okazas kunsido de la **Subtena Sektoro** (2009-09-07) kaj **ĝenerala asembleo (ĜA) de la Scienca Sektoro** (2009-09-11). Tie voĉdoni rajtas la subtenaj membroj resp. la efektivaj

membroj. En la ĜA krome ĉiuj adjunktoj havas la rajton ĉeesti; asociitaj docentoj (ADoc) havas krome la parolrajton.

Tiuj sekcioj, kiuj ankoraŭ ne kompletigis sian estraron por la jaroj 2008–2011, estas petataj okazigi la necesajn elektojn dum la sekci-kunsidoj.

5 Organizaj detaloj

Ĉiu interesulo rajtas aliĝi al SUS. Ne necesas formalaj sciencaj kvalifikoj.

5.1 Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj

Ĉiu SUS-ano rajtas senpage enskribiĝi kaj partopreni kursojn (tion inkluzivas la aliĝkotizo). Kontraŭ aparta kotizo (po 0,3 AKU por unu kurso) oni ricevas oficialan partopren-ateston, ĉeestinte minimume 3/4jn, kaj noton, se oni sukcesis en la kursfina ekzameneto. La ekzameneton oni rajtas partopreni sen ĉeesti la kurson dum la sama SUS, do iamaj kursanoj povas ripeti la ekzameneton.

Ankaŭ pri kursoj ofertataj en la *instruteko* (vidu ĉapitron 6) povas okazi ekzamenetoj por studantoj, kiuj aŭtodidakte preparis sin.

La kursfinaj ekzamenetoj de la sciencaj kursoj okazos ĵaŭde (09-10) posttagmeze, se nenio alia estas anoncita dum la kursoj. La SUS-anoj, kiuj intencas akiri kurs-atestojn, enskribiĝu al la kursoj ĉe la SUS-oficejo komence de SUS aŭ anoncu sian intencon dum la unua leciono.

5.2 Prelegoj

La preleg-kunsidojn gvidas la dekanoj aŭ vicdekanoj de la koncerna sekcio, aŭ komisiitoj de ili. La partopreno en prelegoj (kontraŭe al partopreno en kunordigita preleg-serio) ne egalvaloras al kurspartopreno kaj ne rezultigas stud-unuojn.

Debutprelegojn prezentas nove alvokitaj profesoroj, *docentiĝprelegojn* estontaj plenrajtaj docentoj de AIS. La prelegoj daŭras po 40–60 minutojn, inkluzive de diskuto kaj paŭzeto. La preleglingvo estas ILo.

La sama tempo estas je dispono por *invititaj prelegoj* (en iu ajn oficiala lingvo de AIS) kaj por *projekt-akceptigaj prelegoj* (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan originalan akiron (ne adopton) de grado de AIS.

Ankaŭ liberaj ISKanoj (t. e. ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj apartenas al AIS) rajtas prezenti t. n. *liberajn prelegojn*, pere de la dekano de la koncerna sekcio. Tiaj prelegoj rajtas okazi en iu ajn oficiala lingvo de AIS kaj daŭri po 25–40 minutojn.

Ankaŭ *konciz-prelegoj* (10–20 minutoj) povas okazi en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas oferteblaj ankoraŭ post la starigo de la SUS-programo, tra la koncerna (vic)dekano aŭ (vic)fakarestro. Temoj de konciz-prelegoj ne listigitaj en la programkajero estos afiŝataj dum SUS laŭ la informoj transdonitaj de la prelegontoj al la SUS-oficejo. Laŭeble la prelegantoj mem pretigu du identajn A4-foliojn afiŝeblajn.

5.3 Administrado

La sekretariejo de SUS 31 kaj la ekzamen-oficejo troviĝas en la ter-etaĝo de CER-ES, kie okazos ankaŭ parto de la scienca programo. Tial ili funkcias nur en paŭzoj inter la kursoj kaj prelegoj. Bonvolu laŭeble uzi la unuan paŭzon inter la 10:30 kaj la 11:00, aŭ interkonsenti alian tempon kun la direktoro de la ekzamen-ofico aŭ la sekretario.

5.4 Aliĝo

Aliĝilojn bonvolu sendi al la senata sekretario (Dr. Reinhard Fössmeier, Rahel-Straus-Weg 19, DE-81673 München, Germanio; retpoŝto informo(heliko)ais-sanmarino.org). Informoj pri

SUS 31 troviĝas rete ĉe
`http://www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/sus31`.

Studentoj kun valida studenta numero povas aliĝi neformale per simpla retmesaĝo.

Bonvolu atenti, ke aliĝoj ne estas trakteblaj sen pago de la aliĝkotizo. La kotizo ne inkluzivas ekzamenkostojn, kurskotizojn (por ricevo de atesto), kostojn por loĝado kaj manĝado. Aliĝo ne estas transdonebla.

SUS ne asekuras siajn partoprenantojn kontraŭ malsano, akcidentoj aŭ io alia. Bonvolu atenti, ke multaj malsan-asekuroj ne kovras malsanon en eksterlando. Konsilindas speciala asekuro por eksterlandaj vojaĝoj.

Pagi aliĝkotizon devas ankaŭ *kursgvidontoj* kaj *prelegontoj*; ili rericevos sian kotizon post sia kontribuo. Kurs- kaj prelegproponoj kaj aliĝoj por ekzameno estas trakteblaj nur post alveno de la SUS-aliĝkotizo.

Ĝis kvar semajnojn antaŭ la komenco de la sesio (t. e. ĝis 2009-08-09) la aliĝkotizo estas nur 0,3 AKU, poste 0,5 AKU. Kotizo por unutaga partopreno en SUS estas po 0,2 AKU. Partoprenantoj el reform-eŭropaj landoj rajtas je rabato de **75 %**. La kotizo estas pagebla laŭ jenaj vojoj (ĉiam kun indiko de la pagocelo kaj de la nomo de la aliĝanto):

- al la Germana konto 2051-305 de AIS ĉe Postbank Hannover, banko-kodo 25010030, Swift-kodo PBNKDEFF250; IBAN DE19 2501 0030 0002 0513 05, BIC: PBNKDEFF.
- al la UEA-konto de AIS: aisc-j. (Eblas kreditkarte pagi al sia UEA-konto.)
- Pro la altaj bankokostoj ni petas ne sendi ĉekojn.

ISKanoj, kies servobonhavo havas krediton de almenaŭ 0,5 AKU, povas simple deprenigi la kotizon de ĝi. Dumvivaj subtenaj membroj kaj studentoj kun valida studenta numero ne pagas SUS-kotizon, se ili aliĝas minimume unu monaton antaŭ la sesio; poste ili pagas 0,2 AKU.

5.5 Mono

Kadre de AIS kostoj kaj prezoj estas indikataj en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU). 1 AKU nun valoras € 65,00. Dum SUS 31 AIS akceptas pagojn nur en eŭroj, la loka valuto de Rimini kaj San-Marino.

Uzantoj de bank-aŭtomatoj bonvolu atenti, ke la retpaĝaj informoj de kreditkartaj entreprenoj parte ne mencias San-Marinon kaj parte mencias ĝin sub la lando Italio.

5.6 Salonoj

Dum SUS 31 po pluraj „virtualaj salonoj“ estas kunigitaj al unu reala salono:

- La aranĝoj de la nomotetaj sekcioj (1, 3, 5) okazas en la teretaĝo de CER-ES (salono „1“), kiu do reprezentas la salonojn Schmidt, Peano-Eŭklido kaj Galilejo. Kiam salono 2 estas libera, la preleganto rajtas decidi uzi ĝin.
- La aranĝoj de la idiografaj sekcioj (2, 4, 6) okazas en la supra etaĝo de CER-ES (salono „2“), kiu do reprezentas la salonojn Komenio, Kartezio kaj Aristotelo-Gandhi.
- Ankaŭ la inaŭguro okazas en salono „2“ (virtuala salono Boulanger).

Por la sekci-kunsidoj la sekcioj bonvolu grupiĝi en la du salonoj aŭ interkonsenti pri iom malsamaj tempoj. Liberaj prelegoj laŭeble okazas sen tempa konkurenco en salono 2. Bonvolu atenti ankaŭ la informon pri la sekretariejo en sekcio 5.3.

La salonoj estas nomitaj honore al jenaj eminentuloj:

ARISTOTELO de Stagira / *Αριστοτέλης* (384–322 a. K.)
Helena filozofo, fondinto de la empiria naturscienco en la kadro de ampleksa empiria sistemo kondukanta de la logiko ĝis la ŝtatteorio. Liaj instruoj ĝis la fino de la mezepoko restis la fundamento de sciencaj instruado kaj esplorado. Li estis disĉiplo de Platono kaj instruisto de Aleksandro la Granda.

Georges BOULANGER (1909–1982)
Fondinto (en 1957) de *Association Internationale de Cybernétique* (Namur, BE) kaj ties prezidanto ĝis sia morto; en 1980 enkondukis en tiun asocion ILon kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo. Vicprezidanto de Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciat-grupo AIS.

René DESCARTES, Latine: Renatus Cartesius, ILe: Kartezio (1596–1650)
„La patro de la moderna filozofio“, kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante al ambaŭ racian metodon. Sian mekanikan mondkoncepton li aplikis eĉ en psikologio. Li skizis ankaŭ principojn de planlingvo en sia letero de la 20-a de novembro 1629 al la benediktana scienculo *Mersenne*.

EŬKLIDO de Aleksandrio / *Ευκλεῖδες* (ĉ. 365–ĉ. 300 a. K.)
Helena matematikisto kaj naturesploristo, kiu laboris sub Ptolemeo (Ptolemaios) la 1-a ĉe la „Museion“ en Aleksandrio. Lia plej fama verko estas la libro „Elementoj“, aksioma prezento de la tutaj tiamaj geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis manlibron „Geometria optiko“ kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

Galileo GALILEI, ILe: Galilejo (1564–1642)
Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la Itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksi-modeloj, en kiu li argumentas por nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li verkis ne plu en la Latina lingvo, nekomprenata de vasta publiko.

Mohandas Karamchand GANDHI / *मोहनदास करमचन्द गांधी* (1869–1948)
Barata (hinda) politikisto, kiu proklamis senbatalilan ribelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manŝpinado kontraŭ la teksaj fabrikoj de Britio, per „salmarŝo“ kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto *Edmond Privat*.

Jan Amos KOMENSKÝ, Latine: Iohannes Amos Comenius. ILe: Komenio (1592–1670)
La fondinto de la moderna pedagogio ne nur teorie, sen ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

Giuseppe PEANO (1852–1932)
La Itala matematikisto interalie starigis sistemon por aksioma difino de la naturaj nombroj. En 1903 li prezentis planlingvan projekton de simpligita Latino, nomatan „*Latino sine flexione*“; en tiu lingvo li eldonis sian verkon *Formulario Mathematico*. Ek de 1909 li estis prezidanto de la planlingva akademio *Academia pro Interlingua*.

Hermann SCHMIDT (1894–1968)
Jam en la jaro 1941 la Germana fizikisto kaj regulad-teknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ek de ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de klerig-kibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj branĉoj.

6 Instruteko

Dum SUS 31 eblas akiri studunojn ankaŭ surbaze de memstara studado de kursoj el la instruteko de AIS, se la kandidato sukcesas en kursfina ekzameno per noto de minimume 7/10. La ekzameno povas okazi dum SUS 31, se la kandidato sciigas sian deziron kun indiko de la elektita(j) kurso(j) plej malfrue **ses semajnojn** antaŭ la malfermo de SUS 31 al la ekzamen- kaj klerigofico (OProf. H. D. Quednau, Forstwissenschaftliche Fakultät, Am Hochanger 13, DE-85354 Freising).

Superrigardo pri la Interretaj kursoj de AIS troviĝas ĉe `http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/`. Sed ne ĉiuj tiuj kursoj estas disponeblaj por ekzameno dum SUS 31. Ĉe intereso bonvolu informiĝi ĉe la klerigofico.

7 Situo de Rimini kaj San-Marino

7.1 Rimini kaj San Giuliano

Rimini situas en Italio ĉe la bordo de Adriatiko; ĝi estas ĉefurbo de samnoma provinco en regiono Emilia-Romagna.

Kvartalo *San Giuliano Mare* [san ĝuljano mare] situas norde de la centro de Rimini, transe de la haveno. Ĝi ne havas propran fervojan stacion. Oni atingas ĝin de la stacidomo de Rimini per taksio, publika buso (plurfoje hore) aŭ piede proksimume en kvarona horo. La busaj linioj 4 kaj 8 haltas, transirinte la havenon, ĉe kvar haltejoj en San Giuliano; ili havas la numerojn 6–9. Haltejo 7 (Collini-Sforza) estas la plej proksima al CER-ES, nia SUS-ejo. Bonvolu atenti, ke por grandaj valizoj necesas aparta bileto.

Nia superrigarda mapeto montras la situon de la stratoj Coletti, Briolini kaj Carlo Zavagli, de la maro, la haveno, rivero Marecchia kaj la fervojo. Ruĝa kesto kun litero C indikas la situon de CER-ES. Bonvolu atenti, ke tia skizo ne egalas veran urbomapon kaj ne montras detalojn.

En nia skizo nordo estas supre, kiel kutime por mapoj. Kelkaj mapoj de Rimini prezentas vidon de la mara flanko, tiel ke sud-okcidento estas supre.

Por orientiĝo la mapeto montras la situon de la preĝejoj de San Giuliano (SG), Sanktaj Johano kaj Paŭlo (SJP), Madonna della Scala (MS) kaj San Giuseppe al Porto (SGP).

San Giuliano informas pri si Interrete ĉe adreso `http://www.sangiulianomare.it`. La poŝtkodo de Rimini estas 47900.

SUS-ejo. La SUS-programo en San Giuliano okazas precipe en **CER-ES** (Centro Esperantista de Rimini – Ekumena, Solidareca), ĉe strato *via Briolini* 48. Via Briolini estas flanka strato de via Coletti, direkte al la maro. Se partoj de la programo okazos aliloke, tie estos anonco. Dum la SUS-semajno estos informo pri la loko de la ekzamenejo en San-Marino.

Loĝado. En San Giuliano troviĝas multaj hoteloj. Bedaŭrinde SUS 31 ne ricevis, kiel SUS 30, promeson de 10-elcenta rabato. Eblas tamen indiki, ke dum SUS 30 tiu rabato estis, kaj provi alian hotelon, se iu ne emas doni rabaton.

Klimato. La vetero komence de septembro kutime estas varma kaj suna, kun temperaturoj inter 15 kaj 27 °C kaj mezume ses pluvaj tagoj en monato. Dum pluvoj povas iom malvarmiĝi, precipe en 700 metrojn alta San-Marino.

Alvojaĝo. Rimini havas du elirejojn ĉe la itala aŭtovojo A 14 (Bologna–Bari). Tra la norda oni atingas San Giuliano sekvante ŝildojn.

Fervoje Rimini estas atingebla de Bologna (nord-okcidente) aŭ Bari/Ancona (sude), krome estas loka linio de Ravenna.



Rimini havas flughavenon (nomatan laŭ Federico Fellini, aŭ foje simple „Rimini Miramare“); ĝi situas ĉ. 8 kilometrojn de la urbocentro, al kiu ligas ĝin regula buso. Ĝia IATA-kodo estas RMI, ĝia (modere) kvar-lingva retejo `http://www.riminiairport.com`.

Telefonado. La internacia antaŭnumero de Italio estas **39** (Rimini: 39-0541), tiu de San-Marino **378**. El Italio al San-Marino la numero estas 0549. Por konekto alilanden en ambaŭ landoj ciferumu **00**. Numeroj de krizo-servoj troveblas en ĉapitro 7.4.

7.2 San-Marino

San-Marino estas ŝtateto tute ĉirkaŭata de Italio; ĝia ĉefurbo same nomiĝas San-Marino. Ĝi situas ĉ. 20 km sud-okcidente de Rimini en monteca regiono. Ĝi estas atingebla de Rimini sur t. n. supervojo, kvar-koridora sed ne ekskluzive aŭta. Plurfoje (en somero 2009: 12-foje) tage trafikas buso inter „Piazza A. Marvelli“ (iam placo „Tripoli“) en Rimini kaj „Piazzale Calcigni“ en San-Marino. La horaro indikas por Rimini la ekveturtempon ĉe placo Marvelli; la busoj ekveturas de la stacidomo kelkajn minutojn poste. La veturado daŭras ĉ. 50 minutojn.

de SM	06:30	07:30	08:45	09:45	10:45	11:45	12:45	13:30	15:15	16:30	17:45	19:00
de RI		07:30	08:40	09.45	10:45	11:45	12:30	14:00	14:30	16:30	17:45	19:00

Bus-horaro inter San-Marino kaj Rimini en somero 2009, sen garantio

La oficiala lingvo de San-Marino estas la itala; la parolata lingvo tre similas al tiu de la ĉirkaŭaj italaj provincoj. San-Marino ne estas parto de Eŭropa Unio kaj neniam oficiale subskribis la vizan interkonsenton de Schengen, sed funkcias kvazaŭ parto de la Schengen-teritorio; ne ekzistas limaj kontroloj inter ĝi kaj Italio. La valuto en San-Marino estas la eŭro, same kiel en Italio. San-Marino havas proprajn monerojn.

La urbo San-Marino situas sur la okcidenta flanko de monto Titano, ĉ. 750 metrojn super marnivelo kaj ĉ. 150 metrojn pli alte ol la ĉemonta urbo Borgo Maggiore. Inter Borgo Maggiore kaj San-Marino ekzistas telfero. La historia urbocentro estas ĉirkaŭata de muro; oni atingas ĝin de Piazzale Calcigni (la busa finhaltejo) irante supren kaj tra la pordo de Sankta Francisko. Multaj vojoj en la urbo estas tre krutaj; ekzistas multaj ŝtuparoj.

La orienta flanko de monto Titano, direktita al la maro, estas preskaŭ vertikala kaj ne alirebla. Sur la montokresto troviĝas la baziliko de S-ta Marino kaj la „tri turoj“ de San-Marino. Ĉe bona vetero estas bela vido de sur la kresto al la marbordo.

Bonvolu atenti, ke San-Marino havas propran poŝton; ne uzu san-marinajn poŝtmarkojn en Italio aŭ inverse.

7.3 Pliaj informoj

Pli detalajn informojn pri San-Marino kaj Rimini en Esperanto donas Vikipedio (al kiu AIS regule kontribuas):

`eo.wikipedia.org/wiki/Kategorio:San-Marino`
`eo.wikipedia.org/wiki/Rimini`
`eo.wikipedia.org/wiki/San Giuliano Mare`

Vidindaĵoj en San Giuliano kaj Rimini. San Giuliano posedas modernan jaĥtan havenon kaj kvar kristanajn preĝejojn, inter ili la kirko de Sankta Juliano (ĉe strato viale Tiberio), kun impresa altara bildo de Paolo Veronese kaj poliptiko de Bittino da Faenza. La kirko de S-taj Johano kaj Paŭlo havas mozaikojn kun skriboj en la itala kaj en Esperanto.

Ĉe la fino de la haveno admirindas la romia Ponto de Tiberio. Ĉe via Madonna della Scala estas restaĵoj de la urbaj muroj de Rimini.

La urbocentro de Rimini posedas multajn vidindaĵojn, ekzemple la Arkon de Aŭgusto kaj la Malatesta-templon, nomatan de la lokanoj „Il Duomo“ (= la katedralo). Proksime de la stacidomo estas la restoj de romia amfiteatro. Parko Fellini, proksima al la maro, estas atingebla tra strato *viale Principe Amedeu*, dekstre en nia mapo-skizo sur paĝo 9.

Vidindaĵoj en San-Marino. La ĉefurbo San-Marino prezentas imponan historian centron kun plene konservitaj urbaj muroj. La kreston de la monto Titano kronas la baziliko de Sankta Marino kaj la „Tri Turoj“, videblaj ankaŭ en la blazono de San-Marino.

La historia centro situas sur la okcidenta flanko de la monto kaj prezentas grandajn nivel-diferencojn; multaj stratoj estas deklivaj. De malsupre (bus-stacio) oni eniras ĝin tra la pordo de Sankta Francisko, kies preĝejo estas proksima. Centre troviĝas la Publika Palaco, sidejo de la registaro, kun statuo de Libero. Ĉe la norda fino de la monto troviĝas la supra stacio de la telfero al Borgo Maggiore. Tie eblas vidi ĝis la marbordo, kiam la aero estas klara. Sur ŝtuparoj laŭ la suda muro eblas iri supren ĝis la Unua Turo, Oni preterpasas la mezlernejon, kie jam plurfoje okazis SUS-aranĝoj. La Dua kaj Tria Turoj situas ekster la muroj, pli sude.

La orienta flanko de Monto Titano, kun la tri turoj kaj la baziliko

7.4 Telefona krizo-voko

Uzantoj de poŝtelefono povas ĉiulande atingi ĝeneralan krizo-servon per la numero 112. Por kabloretaj telefonoj, ankaŭ publikaj, validas pluraj numeroj, funkcie tre similaj en Italio kaj San-Marino; se oni ja atingas malĝustan servon, tiu pludonas la krizovokon.

Ĝendarmoj/karabinieroj	112
Ĝenerala krizo-servo	113
Fajrobrigado	115
Medicina krizo-helpo	118

Kelkaj utilaj esprimoj en la itala lingvo

	Itale	Prononco
bonan matenon!	Buon giorno!	bŭon ĝorno
bonan tagon!	Buon giorno!	bŭon ĝorno
bonan vesperon!	Buona sera!	bŭona sera
ĝis revido!	Arrivederci!	arrivederĉi
pardonu!	Scusi!	skuzi
mi petas	per favore	per favore
dankon!	Grazie!	gracje
ne dankinde.	Di niente.	di njente
mi ŝatus...	Vorrei...	vorrej'
ni ŝatus...	Vorremmo...	vorremmo
– trinki ion	– bere qualche cosa	bere kŭalkoza
– malgrandan bieron	– una birra piccola	una birra **pi**kola
– du grandajn bierojn	– due birre medie	due birre medje
– la menukarton	– il listino/ il menù	il listino / il menu'
la fakturon, mi petas.	Il conto, per favore.	il konto per favore
necesejo	Gabinetti	gabineti
– virinoj	– donne	donne
– viroj	– uomini	ŭ**o**mini
kie estas...	Dove si trova...	dove si trova
la stacidomo	la stazione	la stacjone
hotelo ...	l'albergo ...	lalbergo
la bushaltejo	la fermata dell'autobus	la fermata del **aŭ**tobus
bileton al...	un biglietto per...	umbiljeto per
du biletojn al...	due biglietti per...	due biljeti per
tien kaj reen	andata e ritorno	andata e ritorno

Tabela programo de SUS 31

	sal.	A 9:00–10:30	B 11:00–12:30	M	C 15:00–16:30	D 17:00–18:30	V vespere
dim 06	1 1				16.00 sekretariejo		
lun 07	1 2	inaŭguro, SubS	H2 Pennacch.	p	K1 Fössm.	M1 Lewander- ska-Quednau	sekci- kunsidoj
mar 08	1 2	M1 Lewanderska-Q. AS1 Rössler	H2 Pennacch.		K1 Fössm.	prelegoj	AIS D
mer 09	1 2	M1 Lewanderska-Q. AS1 Rössler	H2 Pennacch.		K1 Fössm.	prelegoj	Akademia Forumo (2)
ĵaŭ 10	1 2	M1 Lewanderska-Q. AS1 Rössler	H2 Pennacch.		K1 Fössm.	ekzamen- etoj	
ven 11	SM	Publikaj finekzamenoj				Ĝ. A. solena fermo	
sab		foriro					

P = prelego M-p3, 14:15

Salonoj

Alordigo inter virtualaj kaj realaj salonoj			
Virtuala salono	Reala salono	Celo	
Boulanger	2	inaŭguro, forumo, ĜA	Komparu la klarigojn en ĉapitro 5.6
Schmidt	1	Sekcio 1 (kibernetiko)	
Komenský	2	Sekcio 2 (homsciencoj)	
Peano-Eŭklido	1	Sekcio 3 (strukturs ciencoj)	
Descartes	2	Sekcio 4 (filozofio)	
Galileo	1	Sekcio 5 (natursciencoj)	
Aristotelo-Gandhi	2	Sekcio 6 (morfosciencoj)	
Boulanger en San-Marino	SM	Finekzamenoj, fermo	

Kalendareto								
	lu	ma	me	ĵa	ve	sa	di	
aŭg	31	1	2	3	4	5	**6**	
sep	**7**	**8**	**9**	**10**	**11**	**12**	13	sep
	14	15	16	17	18	19	20	